# BULTENO DE LA ALBANA ESPERANTO-INSTITUTO

**N-RO 68 DECEMBRO 2006**

Proverbo:

Estraro: Doc. Vasil Pistoli, Bardhyl Selimi, Rita Permeti
Retadresoj:
a_myrazi@yahoo.com,
adoci@gmx.de,
agimperaj@yahoo.it,
anila.sokoli@raiffeisen.al,
apistoli@aol.com,
arbibasho@yahoo.it,
beqirajs@hotmail.com,
bselimi@gmail.com,
cara.e@markdist.com,
donika.kapollari@rt.grp.com,
dritanxhindole@hotmail.com,
egli_b@wp.pl,
eltonzaimi78@yahoo.com,
enkelaxhamaj@yahoo.com,
ereid@wp.pl,
ervincanga@yahoo.com,
fiorialbtours@yahoo.com,
gentianymeri@yahoo.com,
hysaerald@yahoo.it,
klotirama@hotmail.com,
klotirama@yahoo.com,
lorushi_1986@yahoo.com,
matildasokoli@yahoo.com,
mgumeni@lincoln.org.al,
mimoza.blomberg@apoteket.se,
mirela_biba@hotmail.com,
motto@bwc.org,
n_limaj@yahoo.com,
ne_sokoli@yahoo.com,
nesokoli@hotmail.com,
notemarius@yahoo.com,
pistolia@yahoo.com,
sambeg2000@yahoo.com,
selimibardhyl@yahoo.com,
sh.ha@hotmail.com,
shabanhasani@gmail.com,
tcobani@yahoo.com,

uliambinozi@yahoo.co.uk,
worldofleda@yahoo.com,

## Enhavo

Ni kaj AIS, ILEI, UEA
Propagando
Leteroj
Novajxoj
Informoajxoj
Rakontoj

de: "Katalin Kovats"
**E-o sur la hejmpagxo de la Konsilio de Euxropo**
Saluton,
Ankaux en Esperanto-traduko estas publikigitaj oficialaj dokumentoj sur la hejmpagxo de la Konsilio de Euxropo.
Okaze de la morgauxa Euxropa Tago de Lingvoj, la Konsilio de Euxropo kun la Euxropa Centro de Modernaj Lingvoj (Graz) funkciigas dulingvan hejmpagxon por informi pri la arangxoj kaj kunordigi la eventojn de la tago.
Sur la hejmpagxo legeblas pluraj artikoloj en la du oficialaj lingvoj. Krom etaj esceptoj. En unu kazo estas aldonita germana, kaj en alia hungara kaj cxehxa tradukoj.
Eluzante tiun eblon kaj unu el la principoj de la kampanjo, nome ke „gxi povas koncerni CXIUJN lingvojn lernitajn en lernejo aux en pli posta vivperiodo" edukado.net komencis traktadon kun la respondeculoj.
Danke al diplomatia taktikumado ni fine sukcesis atingi ke almenaux en tiuj vicoj kie jam estas aliaj lingvoj, hodiaux oni aperigis ankaux esperantlingvajn tradukojn.
Por povi konvinki la instancojn pri tio ke jes ja Esperanto havas parolantojn, kiuj partoprenas en la kampanjo, mi invitas vin demonstri tion.
Jen la ebloj:
Bv. viziti la sekcion TAGO de LINGVOJ en la pagxaro de www.edukado. net kaj tie fari almenaux unu el la subaj ebloj:
1) legi la erojn de la sekcio Instruu vian lingvon kaj eventuale kontribui per opinio aux nova ero (tion vi povas fari en la sama parto aux en mesagxo al  HYPERLINK "http://us.f301.mail.yahoo.com/ym/Compose?To=redaktanto%40edukado.net" \t "_blank"
redaktanto@edukado. net
2) esprimi viajn pensojn pri la tago kaj ties celoj en la pagxo: Opinioj, mesagxoj
3) legi la koncernajn informojn, dokumentojn laux via placxo, intereso kaj tempo.
Ni opinias la atingajxon granda pasxo antauxen sur la vojo de oficialigo de Esperanto cxe politikaj instancoj. Ni havas cxiujn bazojn por vere celebri la Tagon de Lingvoj.
Amike salutas vin kaj ankaux cxi-loke dankas miajn kolegojn por la tradukhelpoj:
**Katalin Kovats, redaktoro**

**Informo de MondAeTUR**

Tre estimataj geuzantoj de MondEtur ttt-o!

En multaj mondpartoj jam komencis amŴuno kaj nombraj el vi bonege ripozis je de vi elektita belega loko apud maro, en montaro amĠvizitante diversajn landojn por ekkoni kulturon de alilandanoj. Multaj el vi tutcerte ťestis Esperanto turismajn aran

En multaj mondpartoj jam komencis aŭtuno kaj nombraj el vi bonege ripozis je de vi elektita belega loko apud maro, en montaro aŭ vizitante diversajn landojn por ekkoni kulturon de alilandanoj. Multaj el vi tutcerte ĉeestis Esperanto turismajn aranĝojn kaj ĝuis tre interesan societon de gesamideanoj. Verŝajne nun plenaj de fervoro kaj senlacigitaj vi ĝuas labortempon.

Eble jam nun iuj de vi pensas pri sekvonta jarripozo vizitonte iujn novajn lokojn. Ni ]štegus se por pluraj el vi loko de la sekva ferio estos belega Tajlando kaj ni pretas helpi al vi

Eble jam nun iuj de vi pensas pri sekvonta jarripozo vizitonte iujn novajn lokojn. Ni ŝategus se por pluraj el vi loko de la sekva ferio estos belega Tajlando kaj ni pretas helpi al vi ĝuegi restadon ĉi tie. Ĝis la fino de la monato septembro ni finos diversajn turismajn programojn por viziti landon de ĉiam ridetantaj homoj - getajlandanoj (eĉ dum la nuntempa malgranda politika landkrizo ili ridetas!). Tuj post tio ni sendos turismajn proponojn al vi por elekti kion kaj kiam veni.

Ni sendas al vi ĉiuj ttt-o paĝaron de MondEtur. Tiuj kiuj jam legis pri la kompanio uzos la tekstojn por refreŝigi scion pri niaj agadoj kaj novaj gelegantoj tutcerte trovos ion por si mem je niaj paĝoj.

Salutas vin varmege stabo de MondEtur Esperanto kompanio por zorgado kaj servado.

Salutas vin varmege stabo de MondEtur Esperanto kompanio por zorgado kaj servado.

**KORESPONDPETO**

Karaj Cxiuj!

Mi estas hungara instruistino en misxkolca bazlernejo, kiu instruas ankaux Esperanton en kvara klaso. En tiu cxi lernojaro mi havas 23 entuziasmajn gelernantojn, kiuj sxatus korespondi kun samagxuloj el aliaj landoj. ( Ili estas 10 jaraj) Cxu konas iu lernejon en eksterlando,
kie gelernantoj lernas Esperanton? Se jes, bonvolu helpi al mi trovi korespondantojn al miaj infanoj.

Antauxdankon! Ilona Fedor
ilonaf@freemail.hu

**Aperis filmo 'Gerda malaperis' sur DVD**

Karaj gesamideanoj!
Se vi ankorau ne achetis la filmon Gerda Malaperis (DVD)
ne perdu la tempon! Estu rapida!
Ghi kostas nur 16 eurojn + sendokosto (6 eurojn)
Profitu la rabaton por esperantaj kluboj kaj asocioj!
Bonega lernomaterialo por disvendi al gelernantoj
kaj helpi ilin paroli plej flue kaj frue!
Por pliaj detaloj skribu al:
mendoj@imagufilmo. org
Por mendi la DVD-ojn, vi povas:
* eniri la pagharon www.imagufilmo. org kaj plenumi "mendoj"
* au simple sendi vian kompletan adreson kaj
kiom da DVD-ojn vi volas al
mendoj@imagufilmo. org
En la pagharo vi trovos informojn pri pagmanieroj.
Salutas Karen & Joe
www.imagufilmo. org
Bert SCHUMANN
9 rue du Couradin, FR-35510 Cesson-Sévigné
Respondu Unikode UTF-8

From: "Molnár Lajos Dr." <ludoviko@freemail.hu>
To: <lingvolancxilo@googlegroups.com>
Date: Sat, 30 Sep 2006 13:33:54 +0200
Subject: [Lingvolanchilo] Re: Internacia Laborgrupo Lingvolanc'ilo: reta grupo pretas
Kara Christian!

En la enkonduka parto de la aldona'jo ni precizigas la celojn de la Internacia Laborgrupo Lingvolan'cilo.
En unu el niaj sekvantaj cirkuleroj ni dissendos nian artikolon, aperintan en la lasta numero de la Internacia Pedagogia Revuo. En la artikolo ni denove, pli detale priskribas tiujn celojn.
La plej grava celo estas krei kontaktojn de tiuj Esperanto-pedagogoj, kiuj instruas Esperanton en bazgradaj lernejoj, kiel la unue lernendan fremdan lingvon kaj kapabloevoluigan lernobjekton.

Elkore kaj plej amike salutas Vin
Ludoviko kaj Julinjo

**El la leteroj**
Dankon pro la bulteno. Mi vidas, ke vi estis en  Florenco, bone por vi. Mi

nun estas denove hejme, ne revidis niajn samklubanojn  kaj do ankoraux ne scias, cxu ili estis en Albanio post la kongreso. Afriko  multe seniluziigxis min. ks-Jugosalvio estis multe pli bona kaj Germanio ankaux ege interesa kaj helpo, dum en Afriko oni sencxese (ecx de esperantistoj) estas petata al la kaso,kaj estas preskaux nenia kultura vivo.
Robert  Pontnau

Kara Bardhyl,
elkoran dankon por via bulteno.
apartan dankon por la publikigo de kelkaj informoj de AVE !
kaj same apartan dankon ke mi metis la leteron al Anisa Proda rekte sub la AVE-informoj.
Do, tiel mi konas shian nomon - se estas la junulino kiun mi renkontis en la kongresa balo (sed ne rimarkis ke shi ne vidas - evidente mi estis blinda chi-rilate). do, se vi renkontas shin bonvolu saluti de mi - la sekvan fojon mi agos pli agrable (espereble).
Chu vi partoprenos KAEST ?
Mi prelegos tie pri Agendo 21 - certe ankau temo en Albanio (temas pri daurigebla evoluo sur nia planedo - dum la 21a jarcento).
Bondezirojn, amike, Manfred
Amike salutas / Mit freundlichen Grüßen
Dr. Manfred Westermayer, Kandelstr. 62, D-79194 Gundelfingen
Tel. +49-(0)761-584854

**Informoj de Manfred WESTERMAYER**
- Regasiga stacio planata en Italio por tergaso el Nigerio por la itala nafto-firmao ENI. Pro la malbonaj kondicxoj en Nigerio por la naturo (medio-malpurigo) kaj por la homoj (manko da civitanaj rajtoj, mortigo de manifestaciantoj) itala grupo protestas kontruax tia ekspluato-maniero.
Pli detalan leteron vi ricevos baldaux.

- Karbominejoj en Rusio, Ukrainio kaj Kasahxio parte sub posedo de Lakhshmi Mittal estas viv-dangxeraj, cxar la firmao ne investas en sekurecon. En la minejo Lenin en Karaganda mortis 41 ministoj, en la ukrainiaj karbo-regiono Doneck cxiujare mortas cx. 100 ministoj; aparte en  "Sasjadko" dum la lastaj 7 jaroj okazis 4 gravaj eksplodoj kiuj mortigis pli ol 120 ministojn. (laux E. Windisch, BZ, 2006-09-22, p.9)

- Radioaktiva rubajxo-monto enhavanta radioaktivan rubon produktas la radioaktivan isotopon de Hidrogeno Tricio, kiu poste trovigxas en

grundakvo (700 Bc/l); tio signifas ke tiu akvo estas sep-foje tro alta je
radioaktiveco. Kamparanoj uzas la akvon por iliaj bestoj. (laux Greenpeace/Verdpaco en Schrot&Korn, 2006-07, p. 8)
rim: Schrot&Korn estas jxurnalo cxefe por informi pri biologia nutrajxo.

- P.R.Cxinio nordokcidenta provinco Shaanhxi: je la firmao Jongning Drilling (=ekspluato) okazis oleo-akcidento, pro tio oleo elfluis en la riveron Gxou (cn: Zhou) - entute sur 9 km. (laux afp, taz, 2006-08-14, p.8)

- Euxropo eksportas venenon al Afriko, Ebura Bordo: tie mortis pluraj homoj kaj bestoj kaj multaj estis severe damagxigitaj. 500 t da alt-venena rubajxo ne-legale estis sxutitaj proksime de la cxefurbo Abidjan. Laux EU-Legxara, tia rubo devas esti traktita (neniigita) ene de
la lando kie gxi estas produktita. Korupcio (ambaux-flanka) kaj avido de
la blankuloj ebligis la eksporton. (laux taz, 2006-09-15, p.1ff)

- Tutmonda Banko: investas en nukleajn centralojn kaj gigantajn barlagojn lauxdire por batali kontraux la malricxeco. Sed fakte per la barlagegoj ili detruas la naturon kaj forprenas la vivo-areojn por la malricxuloj, kiuj kutime ne ricevas tauxgan anstatauxajxon (same en Hindio, kiel en Cxinio, ktp.). La asocio IRN (Internacia Retejo por la Riveroj) <
- Tajvano: 2005 Ben-Q acxetis fabrikon por produkti la mobilajn telefonojn de la germana firmao Siemens. Ben-Q ricevis multe da mono de Siemens kaj de la cxi-rilata landa registaro (NRW) (cx. 350 milionoj EUR); ili garantiis la dauxrigon de tiu fabriko por kvin jaroj. Sed
nun ili klarigis Insolvencon (ne-pagipovecon) de la fabriko - kaj evidente
antauxe ili forportis la valorajxojn (patentojn kaj similajn dokumentojn,
valoro laux la fabrika-konsilisto je 1 miliardo) al Tajvano. Cx. 3000 da
laborlokoj estus neniigitaj. La laboristoj ecx akceptis redukton de salajroj antaux la forvendo al Ben-Q. Evidente kontraktoj ne plu validas.
Sed ankaux Siemens perdis la bonan famon, cxar ili ne sukcesis evolui la propran firmaon. (laux N.Liebert, taz, 2006-09-30)

- Usono, Kalifornio: la guberniestro Schwarzenegger instigas la investon en alternativaj energioj kaj postulas multe da mono de

auxtomobil-produktantoj por malpuraj ellas-gasoj (ab-gasoj).
rim-o (AVE/mw):
Sed - kiam Schwarzenegger avangarde abolicios la mortpunon ?

----------------
Amike salutas / Mit freundlichen Grüßen
Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE) - sekretario
Manfred Westermayer, Kandelstr. 62, D-79194 Gundelfingen
www.comlink.apc.org/ave/

Estimata Bardhyl,
Dankon pro la sendita bulteno albana. Ghi estas tre bunta kaj informricha.
Nia E-aranghoj ventjare okazos en Vatra Dornei (kiel vi legis en la raporto de Mihai Trifoi), t.e. en la norda Moldavio, en belega ripoz- kaj kuracloko.
Chu vi povas noti tion en via venontjara vojaghprojekto? Komence de septembro. Mi ghoju se vi povus partopreni.
Mi havas peton al vi: chu vi povas diri al mi kiuj rumanoj estis monsubtenitaj dum la UK en Florenco?
Amike,
Aurora

---

Kun mia danko, Geraldo

**Projekto Indigxenaj Popoloj**

Projekto Indigxenaj Popoloj celas uzi Esperanton por eviti la perdoj de lingvoj, kulturoj, kaj scioj indigxenaj tra la mondo. Se indigxenaj popoloj kaj individuoj povos komuniki unu kun alia per Esperanto, ili povos trovi reciprokan helpon kaj subtenon, kaj povos pli efike dawrigi, evoluigi, kaj diskonigi siajn kulturojn kaj vivmanierojn. Se ili povos komuniki kun aliaj Esperantistoj, cxiuj povos pliricxigxi kulture kaj spirite.
Por ekkomuniki kun Projekto Indigxenaj Popoloj (PIP), kontaktu:
S-ro Agavo (Erik) Felker
ejfelker@dslextreme .com
414 E. Cedar Ave., Apt. 11 / Burbank, CA 91501 / Usono

**Alvoko de UEA prezidanto**

Karaj agantaj esperantistoj,

mi dubis, c'u ree sendi al vi ankau' c'i tiun jaron la kutiman ritan alvokon pri la labor-plano. Tamen, vidante, kiom bone pluraj el vi el pluraj landoj respondis je la alvoko por la Ago-Tago, mi retrovis mian entuziasmon.

La alvoko estas simpla: en c'iu via organizaj'o, loka, landa au' internacia provu starigi labor-planon, en kiu estu la tri branc'oj: informado, instruado, utiligado, kaj provu agi lau' tiu laborplano en la komencig'anta labor-jaro.

La konkretajn erojn de tiu laborplano varios, evidente, de situacio al situacio. Mi listigas c'i-sube la punktojn de la labor-plano de UEA nur por doni al vi ideojn.

Ne forgesu, ke ni laboras por lingva demokratio, kiel diras la g'enerala subtitolo de la plano. Pri tio mi estas fiera kaj mi petas vin esti fiera antau' la komercistoj pri la lingvoj de la potencaj landoj, kiuj eble diros al vi "Ho, c'esu! La angla jam venkis. Sufic'as agnoski sian subulan pozicion!"  Agu lau' tio, kio "en kor' al vi sonas", por repreni la vortojn de Zamenhof.

Amike

Renato

--------------------------------------------------------------------------------

LA PLANO DE UEA -- 2006/2008

PLANITAJ AGADOJ en la periodo 2006-2008:

INFORMADO

Pri cxi tiu agadkampo la rolo de UEA estas komplementa al la rolo de landaj asocioj, lokaj Esperanto-grupoj kaj individuaj esperantistoj. Cxiuj estas petataj kunlabori laux sia kapablo.

* Dauxrigo de la Strategia Forumo de la Esperanto-Komunumo kun la celo kunlaborigi cxiujn organizajxojn reprezentantajn la Esperanto-komunumon ankaux ekster la kongresa periodo.

* UEA faru planon por okazigi varbkampanjon kun celo fortigi sin, sian membraron, sian ekonomion, siajn landajn asociojn kaj siajn fakajn asociojn.

* Okazigo de specifaj agadoj en cxiu mondoparto por firmigi la movadon tie kunlabore kun la tie ekzistantaj landaj asocioj. Depende de la stato de la movado povos temi pri inform-kampanjoj, kunvenoj, stabiligo de administraj unuoj por la Esperanto-movado en tiu mondo-parto.

* UEA produktu gxisdatajn profesi-nivelajn informmaterialojn pri Esperanto kaj gxia movado - kiujn oni povus utiligi por produkti proprajn nacilingvajn informilojn kaj transdoni al jxurnalistoj, lingvistoj, simplaj  interesigantoj... - kaj prizorgu ilian disvastigon por internaciaj kaj landnivelaj uzoj.

*UEA, kunlabore kun apartaj komisiitoj, starigu aux/kaj aktivigu kunlaboron inter landaj asocioj por intersxangxo de spertoj kaj planoj pri informado al ekstera publiko en naciaj lingvoj kaj gxi utiligu tiuj materialojn por aktiva informado en akceptemaj internaciaj medioj.

* La Estraro de UEA kunlabore kun la estraro de CED instigu landajn Esperanto-organizajxojn krei sciencajn societojn, institutojn aux alispecajn instituciojn por povi pli profesie kaj kompetente starigi kontaktojn kaj kunlaboron kun sciencaj partneroj.

* La Estraro de UEA instigu landajn Esperanto-organizajxojn starigi kontaktojn kun siaj registaroj kaj tute aparte kun la landaj instancoj, kiuj tenas ligoj kun internaciaj organizajxoj.

* UEA dauxrigu la Koalicion de NROj por Internacia Helplingvo kun la celo mobilizi neregistarajn organizajxojn cxe UN por disvastigi la ideon kaj eblecon de internacia helplingvo. Samtempe gxi intensigu siajn rilatojn kun Unesko, cele al komunaj agadoj je nacia kaj internacia niveloj.

* UEA instigu al dauxrigo de informaj agadoj al internaciaj instancoj en Euxropo kaj, kie ili ekzistas, en aliaj kontinentoj.

* UEA zorgu pri rilatoj interalie kun la Supera Komisiito de UN pri Homaj Rajtoj kun la celo atentigi pri la lingva dimensio de homaj rajtoj kaj pri Esperanto kiel tauxga solvo.

* La asocio plibonigu la fluon de informoj inter la membroj, la landaj asocioj, la komitato, la estraro, la CO kaj ceteraj instancoj ligitaj al UEA.

INSTRUADO

* La asocio dauxrigu la kunlaboron kun ILEI kaj kun cxiuj aliaj

esperantistoj kaj instancoj por la plenumo de sia instruada agado.

* La esperantistoj dauxre laboru kun instruaj instancoj je registara kaj aliaj niveloj por ke Esperanto estu instruata je oficiala nivelo en la lernejoj de la unuopaj landoj.

* Komputil-retaj kursoj kaj servoj ricevu emfazon; estu emfazo por aparte bonaj hejmpagxoj kaj retaj projektoj akcelantaj la lernadon kaj paroligon de la lingvo. Oni aparte atentu en cxi tiu periodo al trovado de lernantoj kaj lernhelpantoj en la retaj kursoj kaj pri kompletigo de la kursoj per la informoj necesaj por enirigi la lernintojn en la Esperanto-komunumon.

* Aparte oni klopodu pluevoluigi la ekzistantajn centrojn por instruado pri Esperanto kaj igi ilin kunlabori inter si ankaux por oferti siajn servojn al neesperantistoj dezirantaj lerni Esperanton.

* La Estraro de UEA, kunlabore kun ILEI, akcelu la produktadon de lerniloj por la landoj/lingvoj, kie ili mankas.

* La Estraro de UEA signife intensigu sian apogon al la projekto Interkulturo de UEA kaj ILEI kaj aliajn projektojn, kiuj celas al instruado de Esperanto kaj ties valoroj:.

* UEA kaj ILEI starigu programon de instruista trejnado, kiel esencan elementon de la starigata komuna ekzamena brancxo "Instrukapablo", klopodante enkadrigi elementojn de tiu trejnado en la strukturojn de oficialaj edukaj instancoj kaj helpi al provoj konstantigi au malfermi oficialajn universitatajn kursojn.
.

UTILIGADO

* La Estraro de UEA instigu la bone funkciantajn fakajn Esperanto-organizajxojn starigi kontaktojn kun internaciaj organizajxoj, kiuj okupigas pri sama aux apuda temo.

* UEA arangxu agadojn en regionoj, en kiuj ekzistas etna/nacia strecxo por pruvi la pac-potencialon de Esperanto kaj aparte apogu tiajn projektojn kiel Indigxenaj Popoloj, Interkulturo, Lingvo de Paco.

* UEA subtenu kulturajn aktivajxojn tiajn, kies realigo estas aparte malfacila pro la diseco de la Esperanto-parolantaro, ekz. La laboron de aktoroj kaj teatraj trupoj, kaj stimulu okazigon de kulturaj festivaloj. UEA subtenu la organizon de ekspozicioj de pentristoj kaj aliaj

artistoj en UK kaj aliaj arangxoj.

* UEA subtenu eldonadon de verkoj en Esperanto, cxu originalaj cxu tradukitaj, laux pli ekvilibra dispartigo laux la diversaj regionaj de la mondo kaj kulturaj fonoj.

* Por la diskonigo de la Esperanto-kulturo en ne-esperantistaj medioj, UEA subtenu la eldonadon de nacilingvaj tradukoj de la originala Esperanto-literaturo.

* Ni trovu solvojn por maksimumigi la eblecojn de esperantistoj en la entreprena kampo, kaj aparte en la turisma kampo, kiu s’ajnas la plej promesoplena.

* UEA provu subteni pli intense la agadon de la Terminologian Esperanto-Centron, kiu nun ekzistas en virtuala formo.

* UEA subtenu iniciatojn utiligantajn Esperanton por jxurnalisma informado, kiel tiu de la reta aperigo de Le Monde Diplomatique aux de aliaj ret-pordegoj. UEA principe subtenu iniciatojn kiel esperantajn televidojn, radiajn elsendojn en Esperanto, k.s. Gxi subtenu minimume per informado pri la iniciatoj.

* UEA subtenu la utiligon de Esperanto en scienco cxefe per verkado pri sciencaj temoj ankaux konsidere de la novaj eblecoj publikigi en la reto, kiel Vikipedio.

* UEA subtenu la utiligadon de Esperanto fare de lokaj Esperanto-kluboj en pluraj manieroj, ekzemple per stimulo al organizo de preleg-vojag’oj, kaj tute aparte serve al la sistemo de rilatoj inter gxemelaj urboj kaj al translima kunlaborado, kie la kondicxoj estas favoraj.

* UEA trovu manieron por revigligi kaj pli vaste utiligi la delegitan reton.

* UEA donu apartan atenton al siaj arkivoj kaj historiaj materialoj, aparte c’e Biblioteko Hector, por plibonigi la kondic’ojn por fakaj studoj pri Esperanto.

Berényi Zsuzsanna Ágnes
<bermatsz@freemail.hu> Kara samideano!Mi gratulas al vi pro la vigtla E-vivo kaj via grandega laboro...

Kara kolego!Miaj samklubanoj, la geestroj de la Medicina Grupo: gesonjoroj dr. Ludoviko Molnár kaj lia edzino drino Julinjo Farkas sendis al vi informon,kaj jxuste nun ili petis min informi vin, ke ili atendas vian respondon. Mi salutas vin: drino Zsuzsanna Ágnes Berényi

Do, dankon al Katalin kaj sxiaj kunlaborantoj - ankaux AVE kelkfoje
skribis al ECML,
rilate la minoritatajn lingvojn en Euxropo, kaj rimarkante la
potencialon de Esperanto.

---------------

Rusio iom krude pritraktas la antauxan kolonion Georgio (Kartvelio),
kaj ecx pli krude
Cxecxenion - kiu estas en stato de kolonio, sed mankas la evoluaj kaj
riparaj laboroj tie
(cxiukaze mi ne legis pri tio).
La aktuala fi-teatrajxo pri Georgio denove fi-famigas la grandan Rusion
- komparebla
kun la nafto-politiko kontraux Ukrainio kaj Transnistrio.
Georgio suficxe rapide transdonis la 4 rusajn spionojn al OSKE, sed Oni
nun cxasas la
georgio-devenajn enlogxantojn en Rusio. Se la sekureco-polico en Rusio
(FSB)  batalus
kontraux mafio kaj similaj ne-legxaj strukturoj de cxia deveno - bone;
sed nun ili batalas
kontraux cxiuj vendistoj kaj  gastejestroj de georgia deveno. Ecx
lernantoj en lernejo de
rusaj soldato-infanoj en Georgio estis forpelantaj. Tio estas stulta
rasismo.

-------
Norda Koreio klopodas reakiri la eblecon transpagi monon per
internaciaj bankoj por ke
la nomenklaturanoj vivu cxiam bele kaj bone - dum la popolo
malbonfartas.
Sxajne pro tio, kaj por festi la naskigxtagon de la prezidento Kim, ili
minacas per prov-

eksplodo de atombombo.
Eble vi scias ke evidente/versxajne ne ekzistas libera Esperanto-grupo en la t.n.
demokrata "Demokrata Popol-Respubliko Koreio"; sed eble vi ne scias, ke ekzistas
hejmpagxo de amikeca asocio por DPRK en Esperanto.
Mi skribos al ili, ke mi respektas la auxtonomion de DPRK, sed malakceptas la
diktatoran sistemon kiu regas neglektante la Homojn Rajtojn de sia popolo.
Mi ja sxatus skribi, ke se DPRK volas partopreni la internacian mono-sistemon ili (simile
kiel multaj aliaj diktatoraj sxtatoj ) devas respekti la Internacian Deklaracion de la Homoj
Rajtoj.
Sed Usono estas malbona prototipo - cxar la Usona registaro tenas homojn en ne-legxaj
koncentrejoj, (ktp.)) - vidu la cxi-jaran rezolucion de SAT.

Plorinda rimarko pri la atombomba stato sur nia planedo:
Bedauxrinde ankaux Usono (k.a.) ne forlasas la vojon evoluigi la atombombojn, tio
ankaux rilatas al la nuklea problemo kun Irano. Du militaj prov-eksplodoj (Hiroshimo &
Nagasaki) jam estis tro. Mi legis la rakonton de auxstralia militisto pri la okazajxo en
Hiroshimo (tradukita de Ralph Harry en Esperanton) - nekredebla centmila suferado
(krom la tuj-mortigitaj).

Amike salutas / Mit freundlichen Grüßen
Asocio de Verduloj Esperantistaj (AVE) - sekretario
Manfred Westermayer, Kandelstr. 62, D-79194 Gundelfingen
www.comlink.apc.org/ave/

de: "Daniel Bebelacqua" <
rdba@adinet. com.uy
Karaj geamikoj:
Kiel de la komenco, Radio Aktiva -interreta radiostacio en Esperanto kaj la hispana-, estas malfermita al la tuta esperantistaro; sed hodiaux gxi volas esti ankoraux pli kunigita al vi por partopreni nian tradician Ago-tagon.
Pro tio Radio Aktiva invitas al cxiu esperantista asocio (urba, regiona, landa, junulara, faka), klubo kaj unuopulo cxeesti la festadon de cxi-tago, sendante al ni mesagxon kun salutoj pro la tago, informojn pri la hodiauxa via agado aux kion ajn vi volos diri, por ke tiu mesagxo estos elsendita hodiaux pere de nia radiostacio.

Pro la tempomanko, ni nur povas promesi elsendi tiujn retmesagxojn, kiuj venos kun sondosieroj por elsendi, cxar eble la tempo no suficxos por legi, surdiskigi kaj elsendi tekstajn ricevotajn mesagxojn. La sondosierojn kun vocxaj mesagxoj prefere sendu per MP3 aux OGG formatoj, sed ankaux validas aliaj formatoj (WAV, RA, RAM, RM, kaj aliaj). Bv sendi la mesagxojn al la privataj adresoj de la prizorgantoj, cxar tiuj kontoj havas pli da spaco por ricevi grandajn mesagxojn:

sonia.risso@ gmail.com
Radio Aktiva elsendas dum la 24 horoj cxiutage, kun programero de 2 aux 3 horoj kiu repetigxas dum la tuta tago, sed hodiaux ni intencas festi la Ago-tagon per pli longa programero. Por auxskulti la radion vi eniru la retpagxon:
HYPERLINK "http://radioaktiva.esperanto.org.uy" \t "_blank"
http://radioaktiva. esperanto. org.uy
kaj surklaku la koncernan ligilon. Estas ankaux alternativan ligilon en la sama pagxo, kaze ke ni ne povas auxdi la radion per la unua. Se ankoraux vi havas problemojn por konektigxi al Radio Aktiva kaj vi havas iun el tiuj programoj: Winamp, Windows Media Player aux Xmms, vi povas -sen eniri nian pagxon- en tiuj programoj elekti "OPEN URL" (malfermu retadreson) aux ion similan kaj doni al la programo la jena adreso:
HYPERLINK "http://secure.interuy.com:3220" \t "_blank"
http://secure. interuy.com: 3220
kaj auxtomate la programo disauxdigos nian radion. Ni atendas vin.
Amike,
Daniel Bebelacqua
respondeculo pri Radio Aktiva

Grazina
Kara Bardhyl, koran dankon pro bulteno, mi volonte gxin legas. Grazina ______...

**Torino-Italio: loghejo por studentoj je favora prezo**
Chu vi devas staghi au "Erasmus"-umi en Torino?
Ekde nun la olimpika urbo ofertas al vi kroman eblecon: restadi dum long-dauraj periodoj en la Esperanto Centro je tre favora lu-prezo.
La Esperanto Centro trovighas che la Fakultato pri Ekonomiko kaj Komerco, je 15 minutoj el la urbo-centro per urbaj trafikiloj.
Interesitoj sinturnu al Rosanna Perottino - telefono +39.3392170617 -
Interesitoj sinturnu al Rosanna Perottino - telefono +39.3392170617 -

zorion99@libero. it
Tio vekis interesigxon de nia samideano Ulian Binozi.
Korespondo inter Artur Doçi kaj Ulian Binozi
Saluton Ulian,
Saluton ,
Mi estas Ulian Binozi al Albanio kaj mi cxiam recevis viajn e-mailojn mi estas studento en Polando urbo de Bydgoszcz kaj mi studas turismikan sciencon en Esperanta lingvo kaj mi jam defendis la diploman verkon kaj mi jam estas Bakalauxro pri turismiko , sed tio e-mailo (la lasta) diras ke estas unu logxejo por studentoj , sed kiuj studentoj ?
kion ili devas fari por vivi aux logxi tie , Cxu estas unu studado , kurso aux lernado en la Esperanta lingvo kaj tio lernejo kiu oferas tion aferon por unu mal preza studentejo . Mi interesas pri tio afero sed mi bezonas informon pli pri tio afero de studado , Cxu estas en la Esperanta lingvo cxu en Itala , Kiom kostas la registrado ? kiom kostas la restado en studentejo? cxu mi povas recevi invitilon post la komencado de unu transkonveracio tra vi kaj mi kaj cxu tio lernejo estas konita al A.I.S.???
mi interesas pri tio afero kaj mi aspetas por recevi respondon .
do . dankon pri la informoj
cxiam bone
__._,_.___
Mi ne konas la aferon kaj ne havas iun rilaton al la organizantoj. Tiele mi ne povas respondi viajn demandojn precize, sed laux mia kompreno de la mesagxo, tute ne gravas kion vi faros en Torino. Prefere vi estas studento, rilatas iel al Esperanto kaj sercxas cxambron je favora prezo. La Esperanto-Centro havas tian cxambron kaj volas ludoni gxin. Tio cxiukaze estas skribita en la mesagxo.
Esperable vi ricevas baldaux pli detalan respondon de la koncernataj personoj. Se ne, kontaktu s-inon Perottino direkte.
Bvl. informi cxi tie, cxu vi sukcesis ricevi la bezonatajn informojn.
Kaj nun en la albana por eviti miskomprenajxojn.
Pershendetje Ulian,
Duhet ta them qe ne fillim, qe une nuk e di si zhvillohet kjo pune dhe as nuk kam ndonje lidhje direkte me organizatoret. Keshtu qe un nuk mund t'ju pergjigjem pyetjeve tuaja saktesisht. Sipas asaj qe une kuptova nga mesazhi, nuk ka rendesi se cfare ti do te besh ne Torino. Preferohet te jesh student, te kesh te besh disi me Esperanton dhe je ne kerkim te nje dhome me cmim te favorshem.
Kjo eshte cka shkruhet ne mesazh. Shpresoj te marresh nje pergjigje sa me te shpejte nga personat qe e dine me mire kete pune. Nese nuk te pergjigjen shpejt, kontakto znj. Perottino.
Te lutem na informo mbi rrjedhen e ngjarjeve, qe ta dime se a i more informatat qe te duhen apo jo.

KONSULTA ASEMBLEO ĈE LA KONGRESO DE LA POPOLOJ
ASKOP
Informero n-ro a6-10 (redaktis : John Agbeli)

De la 06a ĝis la 08a de oktobro 2006 okazis en la centro BCEBI/CBDIBA en Bohicon (Benino), la Seminario de Tutmondismaj Studoj pri temo jena : « Ĉiuj homoj estas civitanoj de la mondo, kuniĝante ni laboru por monda paco ». La celo estis la kreado de afrika reto por tutmondismo.
La malferma ceremonio okazis la 06an de oktobro 2006 sub la prezidanteco de la Reprezentanto de la Justic-ministro, proparalanto de la Benina Registaro, kiu liveris subtenan mesaĝon al la civitanoj de la mondo.
Tiu unu afrika Seminario de Tutmondismaj Studoj fariĝis nepereonta per la plantado de arbido kun la nomo "Arbo de Monda Unueco".
La protokolo de tiu seminario estas de nun havebla en franca (kaj baldaŭ en angla kaj en Esperanto) :
http://www.recim.org/doc/sem2006-fr.pdf
kaj la aldonaĵoj nur en franca :
http://www.recim.org/doc/sem2006-annexes.pdf
Kelkaj fotoj de la seminario : http://www.recim.org/ascop/pr06bild.htm

**PROPONO**
**de procedo por enkonduko de Esperanto kiel oficialan lingvon en Eŭropan Union**

Dum la 7-a kongreso de kroatiaj esperantistoj, okazinta la 18-an kaj 19-an de junio 2005 en Zabok, Respubliko Kroatio, estis akceptita la decido, ke Kroata Esperanto-Ligo sendu ũ-tiun Proponon al plua pritrakto al ũuj Esperanto-organiza5ůj de la ]Ŵatoj-membroj de EmŲopa unio, samkiel al Esperanto-organiza5ůj de ]Ŵatoj-kandidatoj: Bulgario, Rumanio kaj Kroatio.

Per strebado al ekonomia kaj mon-unio kiel antamūondiů por unueco de var-mona merkato kaj fluo de laborforto kaj kapitalo, estis enkondukita unueca emŲopa valuto - emŲo. Ekzisto de tia unueca valuto en plejmulto el la membro]Ŵatoj de EmŲopa unio, donas instigon por nova provo, kies celo estus pli racia funkciado de la Unio kaj pli egalrajta partopreno de ũuj ]Ŵatoj- membroj, nome per enkonduko de Esperanto kiel unu elinter la oficialaj lingvoj de EmŲopa unio.

Procedo de kreo de la oficiala lingvo, kiu estas oficiala en neniu ]Ŵato-membro de EmŲopa unio, šr post ali

Dum la 7-a kongreso de kroatiaj esperantistoj, okazinta la 18-an kaj 19-an de junio 2005 en Zabok, Respubliko Kroatio, estis akceptita la decido, ke Kroata Esperanto-Ligo sendu ĉi-tiun Proponon al plua pritrakto al ĉiuj Esperanto-organizaĵoj de la ŝtatoj-membroj de Eŭropa unio, samkiel al Esperanto-organizaĵoj de ŝtatoj-kandidatoj: Bulgario, Rumanio kaj Kroatio.

Per strebado al ekonomia kaj mon-unio kiel antaŭkondiĉo por unueco de var-mona merkato kaj fluo de laborforto kaj kapitalo, estis enkondukita unueca eŭropa valuto - eŭro. Ekzisto de tia unueca valuto en plejmulto el la membroŝtatoj de Eŭropa unio, donas instigon por nova provo, kies celo estus pli racia funkciado de la Unio kaj pli egalrajta partopreno de ĉiuj ŝtatoj- membroj, nome per enkonduko de Esperanto kiel unu elinter la oficialaj lingvoj de Eŭropa unio.

Procedo de kreo de la oficiala lingvo, kiu estas oficiala en neniu ŝtato-membro de Eŭropa unio, ĉar post aliĝo de unuopa ŝtato al la membraro de Eŭropa unio ĝi alportas sian nacian lingvon inter la jam ekzistantaj oficialaj lingvoj de Eŭropa unio, devas esti efektivigita laŭ modelo de la procedo por enkonduko de la unueca valuto eŭro en Eŭropa unio. Ĉar la procedo de enkonduko de la unueca valuto en plej multaj ŝtatoj-membroj de Eŭropa unio daŭris iom pli ol 30 jarojn, kaj ankoraŭ ĝi ne estas akceptita de ĉiuj membroj, estas necese por enkonduko de Esperanto preskribi pli facilan procedon, kiun ni proponas en fundamentaj fazoj kiel sekvas:

1. Fondi respektivan eŭropan komisionon por gvidi la procedon de enkonduko de Esperanto kiel unu inter oficialaj eŭropaj lingvoj.

2. Unuopaj ŝtatoj akceptas aŭtonomajn decidojn pri aliĝo al la procedo de enkonduko laŭ reguloj de la Unio por enkonduko de Esperanto kiel unu el la oficialaj lingvoj de la Unio kaj sendas sian decidon de la parlamento al respektiva instanco de la Unio.

3. Iom post iom laŭleĝe realiĝas eblecoj por ke unuopaj funkciuloj kaj oficistoj de la Unio parolu kaj uzu Esperanton, kio faros spacon por enkonduko de pluraj tradukistoj, kiuj estas bonaj spertuloj pri Esperanto.

4. Samtempe estas kompilataj komputiligitaj vortaroj Esperanto-nacilingvaj kaj inversaj, kio ebligos pere de Esperanto, kiel pontolingvo harmoniigon kaj samsignifigon de ĉiuj uzitaj terminoj. Por ĉi tiu fazo gravas mencii, ke ĝi devas esti "neperforta fazo", dum kiu ankaŭ plue ĉiu povas uzi la propran nacian lingvon en senpera kaj alia komunikado, sed ankaŭ uzado de Esperanto estas permesata.

5. Ĉiuj leĝoj, tekstoj, kontraktoj kaj aliaĵoj, kiel ekz.: leĝaj preskriboj, ekonomiaj statistikaĵoj ktp. estu publikigataj ankaŭ en Esperanto.

6. Kaj fine, la kompetenta organo de Eŭropa Unio akceptas decidon, ke ĉiu skriba komunikado, krom en naciaj, havu devige samspecan tekston ankaŭ en Esperanto, kaj ke Esperanto estas unu el la oficialaj lingvoj de la Unio.

Kara samideano,
mi ricevis vian informilon kaj d慮歡狆刈
dankas pro gxi; tamen, mi devas diri al vi ke
gxia pezo (pli ol 600KB, kiuj farigxas 913 aldone al la mesagxo) estis problemo
por mia retaliron ege malrapida. Do, mi preferus ne plu ricevi gxin tiel, kaj mi
sugestus al vi la jenon: disponigi ilin ankaux en interreto por elsxutado, kaj
sendi nur la ligilon al mi kaj aliaj homoj kiuj havas la saman problemon.
Alian aferon: vi sendis la mesagxon al plurajn homojn, kaj metis iliajn adresojn
cxiujn en la "al" kampo; preferinde estas meti ilin en la kampo "CCN" (a
kasxita kopio), por problemoj de privateco.
kasxita kopio), por problemoj de privateco.
fartu bone,
fartu bone,
Daniele Binaghi

El La Kroata Esperantisto
DEMANDO:

Kia estas rilato inter simbolo
Daniele Binaghi

Kia estas rilato inter simbolo “pentagramo”, kiu estas parto de ornamaĵo en la baptujo de la preĝejo en Split, tn. “signum Christi” t.e. kvinpinta stelo (maldekstre), nun tiel malamata simbolo en ekskomunistaj landoj kun desegnaĵo de Leonardo da Vinci (vidu:dekstre)?

Arciesperantoretletero n. 12

La angla inundas.
Arciesperantoretletero n. 12

La angla inundas.
Ĉu estus same se estus esperanto inundanta?
La angla ne funkcias kiel internacia kaj samnivela lingvo sed
La angla ne funkcias kiel internacia kaj samnivela lingvo sed ĝia uzado riĉigas anglajn lernejoin de Britio, Usono kaj aliaj angleparolantaj landoj.
La angloj kaj angleparolantoj
La angloj kaj angleparolantoj ĝuas advantaĝon neegala en karieroj kaj en komunikaj komfortoj en la tutamondo.
Esperanto, pro ĝia facileco kaj rapideco de lernado, permesus al neniu elmontri supozitan superecon paragone al aliaj lingvoj sed ĉiuj parolus per ĝi kaj farigus ĝin duan kaj interŝanĝan lingvon.
Reale ankaŭ esperanto estas malaperanta kaj kiu scias ĝin aŭ parolas per ĝi eĉ ne plu metas ĝin en la kariertabeloj por peti laboron.
Kion ni povas fari? Daurigote.......

Renovigita la retpagxo de Arci Esperanto (www.arciesperanto.it).
Nova sekcio kun fotoj kaj la venontaj rendevuoj en unua posicio estas la novajxoj de la sezono.

**"Aperis la unua informletero pri Rusiaj Esperanto-Tagoj en 2007.**
La arangxo okazos cxe la Azova maro, en Suda Rusio, 18-25-an de auxgusto 2007. Estas antauxvidata varia studa, kleriga, ripoza, E-familia kaj movada programo. Krome, kadre de RET okazos arta festivalo, al kiu jam konsentis veni JoMo kaj konataj rusiaj E-artistoj. La logxkondicxoj estas variaj (ordinaraj cxambroj 5 euxrojn tage, komfortaj cxambroj - 15 euxrojn, tendumado - 0,7 EUR, amasejo 1,5 EUR), nutrado - 7 EUR tage (elekteblas vegetara mangxado).

La aligxkotizoj por alilandanoj kaj rusianoj estas egalaj, pageblas per rubloj aux euxroj.
Ekzistas kelkaj aligxperiodoj, nun oni devas pagi 6 EUR, surloke - 15.
Pli detalaj informoj kaj reta aligxilo estas troveblaj cxe www.stelaro. ru"
------------ --------- --------- ------

**Ideo te Johan Derks**

enkonduki sistemecon de produktado de politplanoj (politplano = plano por politika konduto/linio), speciale en landaj asocioj

Por bone funkcianta asocio, kiu respektas demokratan decidpreparadon, necesas iujara redaktado de laborplano, kiu estu proponata al la ĝenerala kunveno por amendado/(mal)aprobo. Tia laborplano devas esti bazita sur multjara strategiplano. UEA havas tion (sed mi dubas pri la maniero lau kiu ĝi estas pridebatata), sed multaj estraranoj de landaj asocioj ne havas scion pri tiu sistemeco. Kiel profesiigi/devigi ilin al uzado de tiu politplanado ? Kiel devigi la estrarojn de landaj asocioj aranĝi debatrondon en sia asocio je loka nivelo por ke la ordinaraj membroj sentas sin influhavaj kaj respondecaj pri la kondutkurso de sia asocio ?

Se A-komitatanoj kun mallongaj linioj al sia estraro pretos intense debati tiun necesecon, landaj asocioj povos fariĝi pli demokrataj kaj iliaj membroj pli envolvitaj.

favori kunlaboradon kun ne-esperantaj scienculoj

Gvidantoj de la Esperanto-movado ofte donas al la Esperanta popolo sufiĉe naivan bildon pri la du vojoj lau kiuj Esperanto gajnos rekonon: desube kaj desupre. La ĉefoj de la movado konvinkos politikajn reprezentantojn kaj regantojn pri la valoro de Esperanto, el vidpunktoj de efikeco, ekonomio, lingvaj rajtoj, kulturo kaj paco, kaj la amaseco de lernintoj kaj lernemuloj de Esperanto devos montri al la politikistoj, ke tiu konvinko povos fariĝi politika realaĵo. Tiuj gvidantoj ne klare diras al sia 'popolo', ke la venko de Esperanto estas utopio, kiu nur en strebado de jarcentoj povos esti realigita kaj ne enpenetriĝos en aktualaj politikaj debatoj. Ni bezonas la kunlaboradon de ne-esperantaj sciencistoj por studi proponojn de projektoj en niĉoj de nia socio, kie tiu efikeco, ŝparado, lingvaj rajtoj, kultura renkontiĝado kaj paco povos esti almenaŭ parte realigitaj. Nia firma kredo en Esperanto malhelpas al ni por propraforte formuli taŭgajn tiajn projektojn.
is nun, ĉiam kiam iu ekstera scienculo montris, ke li alte taksas la valoron de Esperanto, esperantistoj kuris por bapti lin laŭ nia kredo, ne konsciante, ke lia valoro kiel ne-esperantisto estos pli grava ol kiel esperantisto. Memoru Umberton Eco, Charles Durand, François Grin.
Do estas tre grave, ke en nia movado instali
Do estas tre grave, ke en nia movado instaliĝu tradicio kontakti ne-esperantistajn scienculojn por ellabori projektojn.
Jam sub la kapo 'Planitaj agadoj en la periodo 2005-2007' de la Strategia laborplano de UEA 2001/2010 (en
HYPERLINK "http://uea.org/dokumentoj/laborplano.html"
HYPERLINK "http://uea.org/dokumentoj/laborplano.html"
http://uea.org/dokumentoj/laborplano.html
http://uea.org/dokumentoj/laborplano.html
) trovi
) troviĝas la ero
La Estraro de UEA kunlabore kun la estraro de CED instigu landajn Esperanto-

organizaĵojn krei sciencajn societojn, institutojn aŭ alispecajn instituciojn por povi pli profesie kaj kompetente starigi kontaktojn kaj kunlaboron kun sciencaj partneroj.
Ni tenu la estraron de UEA al asignado de mono kaj homforto por helpi realigi tiun kunlaboradon kun sciencaj partneroj.

anstataŭigi kontraŭefikan propagandon per klara efika agado
La manko de diskutado pri kaj diskonigado de klara planado far la naciaj asocioj kunkulpas verŝajne pri fojfoje senrespondeca fanatikado de kelkaj esperantistoj. Ja instigi al propaganda agado sen akurate instrukcii membrojn en kiu maniero agi favoras fanatikecon.
Tio ne sufiĉas por haltigi la 'talpojn' (legu
HYPERLINK "http://www.liberafolio.org/2006/ghenuloj"
**HYPERLINK "http://www.liberafolio.org/2006/ghenuloj"**
http://www.liberafolio.org/2006/ghenuloj
http://www.liberafolio.org/2006/ghenuloj
). Tial mi proponas starigon de kondutkodo por preventi kontramťfikan propagandon.
AnkamĠene de estraroj trovi
). Tial mi proponas starigon de kondutkodo por preventi kontraŭefikan propagandon.
Ankaŭ ene de estraroj troviĝas homoj, kiuj estas regataj de granda idealismo, sed ankaŭ de naiveco. (Tre naiva laŭ mi estas ekzemple la slogano 'Esperanto, dua lingvo por ĉiuj'. Tiu estos ofte komprenata de ne-esperantistoj kiel propono de superŝtata edukado, kiu malhelpos la individuan lingvopreferon kaj eble iam forpremos la naciajn lingvojn. Naiva ankaŭ estas la penso, ke Esperanto ne formortos en tiuj landoj, kie oni neglektas serĉi novajn organizaciajn formojn por gejunuloj kaj sin tenas je la glorado de la kluba sistemo, se tiuj nur altiras ankoraŭ maljunulojn.)
Oni do bezonas renovigi la estrarojn. Aliaj (pli junaj eble) homoj meritas sian ]šncon por apliki novajn, pli profesiajn, pli (politik-)sciencajn metodojn. BedamŲinde, mi dubas
ŵ tiu renovigado povos esti efektivigita sen pli da decidpovo de UEA super la ali
Oni do bezonas renovigi la estrarojn. Aliaj (pli junaj eble) homoj meritas sian ŝancon por apliki novajn, pli profesiajn, pli (politik-)sciencajn metodojn. Bedaŭrinde, mi dubas ĉu tiu renovigado povos esti efektivigita sen pli da decidpovo de UEA super la aliĝintaj landaj asocioj. Sed tio necesigus drastan reformon de la statuto de UEA ………..

krei hierarĥiecon laŭ lingva kapableco
Sub ero 3 mi menciis la fojfoje malutilan korgluiĝemon de (idealismaj) esperantistoj al siaj estraraj funkcioj. Frapas min, ke ĝuste inter ili troviĝas nenormala proporcio de malbonaj parolantoj de la internacia lingvo.
Tiu malbona regado povas esti signo de naiveco aŭ manko je aprezo de intelekta konsiliĝado. Mi pensas, ke ĝenerale tiuj kiuj bone regas la lingvon ankaŭ pli bone sentas la ecojn de tiu lingvo kaj ĝenerale havas pli facilan aliron al intelektulaj rondoj, kiuj povas ludi gravan rolon por la disvastigado de la lingvo.
Per kreado de hierarĥieco laŭ lingva kapableco mi celas, ke laŭstatute oni donos al membroj pli da rajtoj, ju pli ili regas la lingvon. Laŭ mia informiteco tio estis aŭ estas ankoraŭ la kazo en Ruslando, kie nur bonaj parolantoj de la lingvo estas deputataj al naciaj kongresoj.

instali arbitron aŭ komisionon por kvietigi konfliktojn
Abundas la kvereloj inter esperantistoj, ofte ankaŭ sur nacia nivelo. Oni povas akuzmontri multajn kaŭzojn pri tiu bedaŭrindo. Krom forigi tiujn kaŭzojn ni bezonas organon, kiu aŭtoritate klopodu solvi tiujn kverelojn. Ciu aliĝinta al UEA asocio devigu sin akcepti la pacreguligadon de tiu organo.  Mi pensas pri intervenisto (mediatro), eventuale asistata de scianto(j) de la gepatra(j) lingvo(j) de la kontraŭuloj.

akcepti egalecajn lingvajn rajtojn en la statuto de UEA
Laŭstatute la unua celo de UEA estas (artikolo 3) "a) disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo Esperanto". Ĉar en la sama artikolo sub b) skribiĝas: "agadi por la solvo de la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj faciligi la internacian komunikadon", neniu dubas, ke ni intencas Esperanton kiel solvilon por tiu lingva problemo. Ankaŭ multaj esperantistoj ŝajnas diri al aliaj homoj: "La solvo por pli paca mondo estas inter vi. Nur komprenu kaj kaptu ĝin!" (Kristanoj scias, ke ankaŭ Kristo diris: "La Dia regno estas inter vi.", sed lia instigo al akcepto de tiu regno ankoraŭ ne portis fruktojn.)
Ĉu ni esperantistoj devas malhalte kredi en tiu solvo? Kvankam mi estas esperantisto, mi dubas pri la realigeblo de Esperanto kiel solvilo en mallonga tempospaco.
Mi konstatis ke multaj honestaj scienculoj faras tute aliajn proponojn por 'solvi la lingvan problemon' kaj ni riskas perdi nian kredeblecon en la publika opinio konkure al la tut-angla 'solvo', aŭ, se ne rezultos unuela venka solvo en tiu politika konkurado, al la ideo敫涔瑥

, ke meti tiun problemon en la politikan tagordon estas maloportuna.
Tamen ekzistas konkuranta lingvopolitika movado, kiu estas pli-malpli proksima al la nia, tiu de multlingveco kaj de lingvodefendaj asocioj. Fakte inter tiu strebado al multlingveco kaj
la nia estas neniu kontramŤiro. Multlingveco signifas, ke estu establita egalrajteco inter
ũuj lingvoj, do ke malpli fortaj lingvoj estu politike favorataj per specialaj mezuroj, sur nacia (ekz. favore al la Frisa, la Kataluna, la Irland-Gaela, la Emųka ktp.) kaj internacia niveloj.
E Ġpor fari nian utopian solvon pli kredinda al eksteruloj estus grave substreki, ke la esperantismo nur volas konservi tiun multlingvecon. Ja tro multe da ne-esperantistoj kredas, ke Esperanto strebas esti 'la mondlingvo' sen konsidero al la sorto de la naciaj lingvoj. (Alia afero estas la strebado al 'plurlingveco', t.e. ke unuopa homo lernu kiom eble multe da lingvoj. Por ne-lingvemuloj unu fremda lingvo, Esperanto, sufi ŵ; tiun principon ni neniam forlasu, sed ankamĠen tiu rilato esperantistoj ne estu tro dogmismaj.)
En la admirinda 'Manifesto de Prago' oni asertas: "Ni estas movado por lingvaj rajtoj."
En la 'Celdeklaro' de la Strategia laborplano 2001-2010 de UEA oni trovas aldona5ůn pri nia strebado al la esperanta solvo, nome "en la vasta kadro de agado por pli justa mondo."
Tiuj tekstoj lasas pordon malferma: Esperanto kiel solvo en la kadro de multlingveco,
šr tiu favoras egalecajn lingvajn rajtojn kaj do helpas estigi pli justan mondon.
AnkamĬ lamĠla statuto de UEA, sub artikolo 4 (Rimedoj) oni trovas: "Por atingi siajn celojn, la Asocio laboras per &……………… ….& joicosa jaleclimis jaila nuk orobalnuk ".
la nia estas neniu kontraŭdiro. Multlingveco signifas, ke estu establita egalrajteco inter ĉiuj lingvoj, do ke malpli fortaj lingvoj estu politike favorataj per specialaj mezuroj, sur

nacia (ekz. favore al la Frisa, la Kataluna, la Irland-Gaela, la Eŭska ktp.) kaj internacia niveloj.
Eĉ por fari nian utopian solvon pli kredinda al eksteruloj estus grave substreki, ke la esperantismo nur volas konservi tiun multlingvecon. Ja tro multe da ne-esperantistoj kredas, ke Esperanto strebas esti 'la mondlingvo' sen konsidero al la sorto de la naciaj lingvoj. (Alia afero estas la strebado al 'plurlingveco', t.e. ke unuopa homo lernu kiom eble multe da lingvoj. Por ne-lingvemuloj unu fremda lingvo, Esperanto, sufiĉu; tiun principon ni neniam forlasu, sed ankaŭ en tiu rilato esperantistoj ne estu tro dogmismaj.)
En la admirinda 'Manifesto de Prago' oni asertas: "Ni estas movado por lingvaj rajtoj."
En la 'Celdeklaro' de la Strategia laborplano 2001-2010 de UEA oni trovas aldonaĵon pri nia strebado al la esperanta solvo, nome "en la vasta kadro de agado por pli justa mondo."
Tiuj tekstoj lasas pordon malferma: Esperanto kiel solvo en la kadro de multlingveco, ĉar tiu favoras egalecajn lingvajn rajtojn kaj do helpas estigi pli justan mondon.
Ankaŭ, laŭ la statuto de UEA, sub artikolo 4 (Rimedoj) oni trovas: "Por atingi siajn celojn, la Asocio laboras per …………………. kunlaboro kun aliaj similcelaj asocioj …….. ."
Ĉu asocio por multlingveco estas similcela? Miaopinie utilas eksplicite mencii multlingvecon kiel celon. Se ne, nia mesaĝo al la ekstera mondo kaj al la favorantoj de 'nur Esperanto' ne estos aŭdebla.

integri komunikadan teknologion en estradon
Jam estas relative simpla afero fari pertelefonan konferenceton inter pluraj personoj. Ankaŭ por sekura perinterreta voĉdonado ekzistas proceduroj. Nur ili estu diskonigataj kaj trejnataj al estraranoj, kiuj loĝas dise, por ke ilia decidprocezo kaj kunordigado estu kiel eble plej glataj. Kompreneble tio funkcios nur, se la koroj kaj mensoj de la estraranoj estos agordigitaj unu al氰f0污慩
la alia……
.
Mi komprenas, ke grupo de esperantistaj skajpanoj estas tre aktiva. Ili konsilu kaj helpu al estraroj sur tiu respondeca tereno.
------------ --------- --------- --------- -

**SEMAJNO DE HOMAJ RAJTOJ KAJ DE ESPERANTO**

"Homaj Rajtoj" riskas igxi tro banala esprimo, cxar gxi estas redirata tagon post tago, horon post horo de cxiuj inform-kanaloj de la mondo.
Cxiukaze estas unu aspekto de homaj rajtoj, pri kiu oni apenaux parolas. Temas pri la lingvaj homaj rajtoj. Jes, kelkaj izoluloj, neesperantistaj kiel ankaux esperantistaj, parolas pri tio. Ili asertas ke tio, kio estas skribata en la artikolo 2-a de la deklaracio, efektive devas validi, ankaux rilate lingvon.
Fakte en la retejo de la Supera Komisiito de UN pri Homaj Rajtoj.
HYPERLINK "http://www.unhchr.ch/udhr/lang/1115.htm" \t "_blank"
http://www.unhchr. ch/udhr/lang/ 1115.htm
oni povas legi ankaux en Esperanto, ke “Cxiuj rajtoj kaj liberecoj difinitaj en tiu cxi Deklaracio validas same por cxiuj homoj, sen kia ajn diferencigo, cxu laux raso, hauxtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aux alia opinio, nacia aux socia deveno, posedajxoj, naskigxo aux alia stato.”
La rajto ne esti diskriminaciata surbaze de lingvo, do, estas klare menciata tie.

Kaj cxu ni, kiel esperantistoj, ne ekestis gxuste, por ke tiuj rajtoj estu respektataj cxie, kaj, bonvolu atenti, je cxiuj niveloj? Laux mi oni ne rajtas defendi la lingvon de la enmigrinta grupo, kaj ne samtempe tiun de la tradicia malplimulta nacio vivanta en la lando de longa tempo. Oni ne rajtas defendi la lingvajn rajtojn de la malplimulta nacio kaj ne samtempe defendi la lingvajn rajtojn de la tuta lando antaux pli fortaj internaciaj lingvoj. Se ni volas fari du ekzemplojn, ni diru, ke oni ne rajtas batali nur por protekti la oficialajn lingvojn de Euxropa Unio kontraux la evidenta dangxero, ke la angla forvisxos ilin, kaj ne samtempe batali por la lingvaj rajtoj de la bretonoj en Francujo kaj de la turkoj en Euxropo. La samo validas rilate al Cxinujo pri la rajtoj de la cxina, esti unu el la efektive uzataj lingvoj en UN, sed samtempe pri la neceso protekti la naciajn malplimultojn enlande.
Nur esperantistoj povas kompreni la miopecon de multaj landaj aux lokaj grupoj, kiuj opinias, ke ili povos savi sin ankaux se la aliaj pereos, eble cxar ni gxuste naskigxis por defendi la lingvajn h0majn rajtojn je cxiuj niveloj. Fakte Zamenhof, la konata revoluciulo, diris: “Ni montros al la mondo, ke reciproka komprenigxado inter personoj de malsamaj nacioj estas tute bone atingebla, ke por cxi tio tute ne estas necese, ke unu popolo humiligxu aux englutu alian…”. Kaj li ankau' parolis pri la maljusteco kaj malprudenteco de la naciismo de grandaj kaj malgrandaj nacioj.
Surbaze de cxi tiuj ideoj la estraro de UEA alvokas vin festi la Zamenhof-tagon en la kadro de la "Semajno de Homaj Rajtoj kaj de Esperanto", de la 9-a gxis la 16-a de decembro 2006. Jam pasintjare ni diskutis pri tio, ke jam pluraj esperantistoj havis la ideon vastigi la signifon de tiu tago al "Tago de Esperanto" kaj doni al gxi ankaux informan elementon per arangxado de eventoj kune kun aux por neesperantistoj.
Tiu semajno inkluzivas la 10-an de decembro, la cxiu-jaran datrevenon de la Dekalracio de Homaj Rajtoj, kaj la 15-an, kiu estas la Zamenhof-tago.
Do, la Semajno nun lancxata ebligas agadon al la ekstero pri la lingvaj homaj rajtoj. Ekzemple, kolektu informojn de nerespekto de lingvaj rajtoj en via logxloko kaj sendu la pruvon pri tio al UEA, kiu siavice atentigos la Oficejon de la Supera Komisiito pri Homaj Rajtoj de UN. Estas tempo transiri de teoriumado inter ni al agado praktika pri la lingvaj homaj rajtoj. Vi povus arangxi kunvenon pri tio kun neesperantistaj asocioj aux lingvistoj aux instruistoj, ktp. kaj klarigi al ili kial Esperanto estas parto de la tutmonda batalo por la homaj rajtoj.
Samtempe oni povas ankaux zorgi pri la tradicia pli interna agado (festo de la libro en Esperanto, kluba kunveno por memorigi Zamenhof).
Tre bonan agadon eksteran komencis jam de kelkaj monatoj grupeto da aktivuloj, kiu okupigxas pri la Esperanto-tago de verkantoj de retaj tag-libroj, blogoj, kaj ili jam atingas sukcesojn. Vidu en
HYPERLINK "http://esperanto-usa.org/esperanto-tago/. " \t "_blank"
http://esperanto- usa.org/esperant o-tago/.
Multaj aliaj grupoj jam pretigas siajn tradiciajn agadojn.
Ni igu cxi tiun semajnon ilo por atentigi la mondon pri lingvaj homaj rajtoj kaj pri la solvo de ili pere de Esperanto kaj samtempe por festi nian esperantistecon.
Renato Corsetti
From:
"ASCOP" <ascop@recim.org>

## Konkurso pri filmoj

## Aligilo

Persona nomo _______________ Familia nomo ________________________
Naskigurbo kaj –lando ____________________________________________
Naskigdato (TT/MM/JJ) ________________
Mi estas (metu kruceton):
♉ Regisoro ♉ Produktanto ♉ Distribuanto
kaj enskribas la kurtfilmon kun jena titolo: ___________________________
____________________________________________________
Dauro de la filmo: _______________ Produktojaro: ________
Produktolando: _________________ Regisorado: _______________________
Scenredaktado: ________________________________________________
Aktoraro: _____________________________________________________
Fotografia direktorado: ____________________________________________
Scenarangado: _______________________ Muntado: ___________________
Son-efektoj: _______________________ Muzika arango: _________________
Produktado: ___________________________________________________
en la Konkurso “Kurta KinoEsperanto Festivalo”, organizita de Triesta Esperanto-Asocio, okaze de sia 100-jarigo;

MI DEKLARAS

1. preni sur min ciajn respondecojn rilate al la enskribita verko koncerne ties enhavon, plene respektante la autorrajtojn de aliaj verkoj au ties partoj, se ene de gi;
2. ke ciuj personoj, videblaj en la senditaj filmoj, estas konsentaj kaj donis klaran rajtigon por disvastigado de la bildoj en kiuj ili ceestas;
3. rajtigi, ciel, la uzadon de la prezentita verko en ci tiu konkurso;
4. ke ciujn komunikojn pri la konkurso oni adresu al la subskribinto, ce la jenaj adresoj:

hejma adreso: ___________________________________________________
elektronika posto: _______________________________________________
telefona numero: ________________________________
Postelefona numero: ________________________________

5. esti plene kompreninta la regularon, akceptante cion en sia tuto;
6. ke, kaze de ricevo de premio enkadre de la suprenomita konkurso, estu enmetita, je la komenco de la kurta filmo, la jenan indikon, kune kun la simbolo de la 100-jarigo: Associazione Esperantista Triestina – Triesta Esperanto-Asocio esperantotrieste@adriacom.it “Kurta KinoEsperanto Festivalo” prezentas “(titolo de la kurt-filmo)”

Dato (TT/MM/JJ) ___________ Subskribo ___________________________

DEKLARO PRI KONSENTO DE TRAKTADO DE PERSONAJ DATENOJ

MI RAJTIGAS Lau art. 10 L. 675/96 Triestan Esperanto-Asocion trakti informadike miajn personajn datenojn. Kaj ciakaze, respekti mian rajton, lau la artikolo 13 L. 65/96, postuli iam ajn sangon, korekton au forvison de la datenoj mem.

Dato (TT/MM/JJ)_______________ Subskribo ________________________

TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO
Sidejo: Via del Coroneo, 15 - 3° piano
Kunvenoj: marde kaj vendrede, h. 19-21.30
Tel: 040 763128; 040 350093;
@: esperantotrieste@adriacom.it - noredv@tele2.it
http://it.groups.yahoo.com/group/Associazioneesperantistatriestina/
www.esperanto.it - www.edukado.net - www.uea.org

Oni lancas internacian konkurson, je libervola temo,

celebre de la centjarigo de Triesta Esperanto-Asocio, pri kurtfilmoj ital- kaj/au esperant-lingvaj, au alilingvaj sed kun surskribajoj en la itala au esperanta lingvo. La kurtfilmoj povas esti ankau senparolaj.

Arta Direktoro:
Giampaolo COLONI
Prezidanto de la Organiza Komitato:
Edvige ACKERMANN

La verko, sendota al la konkurso, ne estu jam prezentita en aliaj similaj arangoj, tial la autoro subskribu deklaron tiusence.
La kurtfilmo devas esti en formo de DVD au VHS kaj ne superu 15-minutan dauron. Gi ne estos redonita.
La autoro sendu poste sian verkon gis la 15a de decembro 2006, en registrita koverto kaj kun ricev-atesto, al tiu ci adreso:

ESPERANTO TRIESTE
C.P. 601 c/o Ufficio Postale Trieste Centro
IT-34132 TRIESTE – ITALIA

Krome estu provizitaj de la autoro la jenaj informoj:

- vivpriskribo kun aldonita malgranda foto;
- mallonga resumo de la kurtfilmo, kelkaj fotoj, ties titolo kaj la genro, kiu estos elektita inter la sekvaj: komika, horora, kultura-didaktika-dokumenta, komedia, drama, detektiva, fabela, folklora, muzika;
- nomoj de la roluloj kaj de la aliaj autoroj au personoj iel kunlaborintaj en la filma realigado.

Eblas sendi ankau kurtfilmojn jam prezentitajn en similaj arangoj, sed tiuj ci estos EKSTERKONKURSAJ.
Atentu: estas nepre malpermesitaj porno-kurtfilmoj kaj tiuj kun perfortaj scenoj-temoj.
Ciuj alvenintaj verkoj estos prezentataj al publiko okaze de la SEMAJNO DE INTERNACIA AMIKECO - 19-25/02/2007, dum kvin vesperoj je senpaga eniro.
La ceestonta publiko vocdonos la plej bonajn verkojn kaj al tiu vocdono, sumigos tiu de 5-persona jurio, kies nomojn oni diskonigos baldau.
La kurtfilmoj, klasifikigintaj inter la unuaj tri, ricevos premion en formo de pokalo, plato, libroj, krome per

projekciado de la verko en Interreto kaj similaj cenokinejoj.
La decidoj de la jurio kaj de la publiko estas nepriapelaciebla.
Pliaj informoj ce:
nored@tiscalinet.it kaj
ce: www.blog.ialweb.it/esperantotrieste/

**Letero** Inbox

Bardhyl Selimi Tre kara, bv legi la alkrocitigitan leteron mian por

Quednau Hans-Dietrich <quednau@esperanto-muenchen.de> to me, Ani

Estimata kolego Selimi,

Mi aldonas al tiu letero deklaron de la vicprezidanto de AIS,
senatano Minnaja, pri la jura bazo de la agado de AIS konforme al la
decidoj de la instancoj de San Marino
(por uzado dum negocoj kun la rumana ministerio pri klerigado).
Li plej bone konas la iomete komplikajn administraciajn faktojn
pri nia interrilato kun San Marino - pli mi ne povas diri.

La terminon "apostoleca stampo" mi ne konas. Miaj dokumentoj pri
mia kariero en Germanio (studfina diplomo, doktora diplomo, habilita
diplomo, alvoko al profesoro) portas la saman sigelon, kia ankau
trovig^as sub la dokumentoj de AIS.

La devoj de kandidatoj plenumendaj por la magistrig^o dependas de
tio, kion la kandidato jam plenumis dum studado en universitato(j)
ekster AIS.
Ekzemple, se iu jam atingis gradon kompareblan al magistreco en
alia universitato, la postuloj estas malgrandaj:
- verki resumon de la magistra verko en Esperanto
- fari 2 kursojn dum SUS
- defendi antau AIS-komisiono la magistran verkon au alian tezon.
Alia ekstremo estas, se la kandidato havas nur la maturecekzamenon,
sed neniun studadon universitatnivelan. Tiam li devas unue bakalaurig^i
(post studado de 150 studunuoj kaj defendo de bakalaura verko)
kaj poste magistrig^i (post akiro de pluaj 90 studunuoj kaj defendo
de magistra verko)

Do mi petas doni al mi la koncernajn informojn pri vi

Elkore salutas
Dieter Quednau

******************************************

La nova statuto de AIS antau'vidas (art. 3) ke gxiaj aktivadoj kaj celoj estas:
a) instrua aktivado de tipo universitata
b) aktivado tipe akademia kaj esplora

En la sama artikolo 3 estas dirite ke gxi celas realigi organizan strukturon
por internacia kaj interfaka kunlaboro, ebligantan krome al tau'gaj studentoj la akiron de atestoj au' akademiaj gradoj.

La agnosko de tiu nova statuto estis konfirmita de la Administra jugxisto D-ro Giuseppe Costanzo che la administra tribunalo, la 26an de januaro 2004.
Do AIS plu rajtas tute legitime agi, kiel ekde 1983, en la Respubliko de San
Marino. Nenio sxangxigxis kompare kun la unua situacio, escepte de la sxangxigxo de la statuto. En la nova statuto la eblo eldoni atestojn au' gradojn estas eksplicite menciita, tamen estas intence evitita la vorto "diplomo".

Valoron al tiuj atestoj, kiel al cxiuj aliaj de cxiu ajn privata institucio
donas tiuj, kiuj volas doni. La Sxtato San Marino NE agnoskas enlandajn rajtojn al akirinto de AIS-diplomoj (estis cxiam tiel, malgrau' alidirektaj
asertoj).

Ne plu estas la registro, gardita dum dek du jaroj che la Ministerio, kiu enhavis la liston de la diplomitoj; sed ankau' tiu registro neniel donis rajtojn al diplomitoj, malgrau' alidirektaj asertoj.

Mi atente relegis la kontrakton kiu donas eblon de regula kaj legitima agado
de AIS en Rumanio. La Rumana Ministerio rajtigas AIS okazigi kursojn kaj ekzamenojn, cxu sole cxu kune kun rumanaj universitatoj (art. 1); neniel estis en tiu kontrakto engagxita la Respubliko de San Marino, do AIS rajtas
agi en Rumanio samkiel en RSM. Lau' mi ne estas kau'zo nuligi tiun rajton.

Ne plu mencieblas la san-marina kadro-legxo, kiu de longe estis anstatau'ita
de universitata legxo, en kiu AIS ne rolas.

Art. 4 agnoskas en Rumanio la titolojn agnoskitajn de AIS. La Respubliko de
San Marino ne estas engagxita de tiu artikolo, do neniu kau'zo ke tiu

agnosko ne povu esti dau'rigata

Art. 6 antau'vidas registron paralelan al tiu ekzistanta en RSM. Nu, tiu ne
plu ekzistas.
En San Marino ekzistas sxtata universitato, financata de la sxtato, kaj kies
diplomoj (tre malmultaj kaj malvastkampaj) estas agnoskitaj kiel samrajtaj
al tiuj italaj. Krome en San Marino ekzistas ankau' aliaj privataj lernejoj,
sed nur AIS ricevis sxtatan agnoskon por agado.

Do se vi demandas, cxu AIS estas sxtata universitato en RSM, tio ne estas
vera, kaj neniam estis vera;
se vi demandas cxu la diplomoj de AIS havas juran validecon en RSM, tio ne
estas vera, kaj neniam estis vera;

se vi demandas, cxu AIS rajtas private agi kiel universitato en RSM kun la
konscio kaj aprobo de la sxtato kaj lau' la decido de la Konsilio de la 12,
tio estas vera kaj cxiam estis vera;

se vi demandas, cxu AIS rajtas eldoni diplomojn, tio estas klara en la nova
statuto aprobita de la tribunalo (antau'e ne tiom). Tio tamen ne multon
signifas, cxar ekzemple cxiuj Esperanto-diplomoj eldonataj de la E-asocioj
au' E-institutoj havas neniun juran validecon en la plimulto de la landoj,
tamen ili estas legitime donataj, kaj cxiu donas al ili la takson kiun li
volos.

Prof. Dr. H.D.Quednau    Technische Universitaet Muenchen
Am Hochanger 13         Forstwissenschaftliche Fakultaet
DE-85354 Freising       Forstliche Biometrie und Informatik
Tel:   +49 8161 71-4765
Fax:   +49 8161 71-4767
email: quednau@esperanto-muenchen.de
url:   http://www.forst.wzw.tum.de/~quednau

**Rakontoj**

**Rakonto**

**Dritero Agolli**[1]

[1] Dritero Agolli estas unu el la elstraj albanaj verkistoj nunempaj, eksa prezidanto de la Ligo de Vekistoj kaj Artistoj de Albanio dum la totalisma regximo

**Sovagxeco**

Cxi tiu rakonto estas verkita en la jaro 1964, dum la periodo de totalisma regximo, enkadre de la libro “Bruoj de iamaj ventoj”, sed la cenzuro tiutempe malpermesis la publikigxon.

*La vivo iamfoje estas terura, mia amiko. Kelkajn dumvive trafis pli malfelicxega sorto ol tiujn falintaj dummilite, mia amiko...(cxerpita el iu konversacio)*

1

Mia cxevalo haltis antaux la pordon je alta flankmuro. Ulo varmigxanta sub la sunradioj kune kun granda sed maldika hundo, vidis min timigite kaj levigxis.

-Mu-mu-mu!- eldiris li ion nekompreneblan kvazauxnaze kaj pusxis la pordon. Ankaux la hundo postsekvis lin kaj sin kasxis malantaux la pordo. Post iome, la pordotabulo denove malfermigxis kaj mi ekvidis vizagxon malrektigxintan kaj longan langon elstarinta tra du dikaj lipoj kiel hepaton.

-Mu-mu-mu,- faris du dikaj lipoj kiel hepaton. Ankaux la hundo elirigis sian malbelan kaj dormeman fauxkon kaj jxetis sur min indiferentan rigardon.

- Kiu estas cxi tiu salutanta min tiel delikatece?- diris mi al akompananto, elcxevaligxinta jam kaj ridanta.

-Gani, Gani! Cxi tiu kamarado volas forsxteli la vian hundon!- alparolis la akompananto al la homo kun hundo.

-Vi demandas kiu li estas?. Cxu vi ne auxdis jam pri Gani Bredhi?- turnigxis li al mi- Gani Bredhi estas fama cxi tie.

Kaj tiam, tra tiu malnova pordo je putrigxinta pordotabulo, alfiksita per ladaj pecoj, antaux miaj okuloj ekfluis vivo je tiom da perturbajxoj kaj kortremajxoj. Kiom mi mem hezitas priparoli, cxar gxi versxajnigxus terura, nekredebla fablo..

Okazis tie! Dum vintro sxargxita  je negxo, cxi tien oni rimarkis kelkajn nekonatojn. Komence, ili aperis kaj malaperis tra la pordo de tiu domo sxovigxinta je la rando de la monto, poste perdigxis. La sama pordotabulo, dumvespere krakis kaj tra gxin eliris homo kun sako surdorse. La homo surgrimpis la monton kaj revenis, kiam ankaux la monto ekplongxis en la mallumon, same la domo kun kortomuro, kaj la pordo je putrigxinta tabulo.

Iutage alvenis antaux la pordon tri viroj kun auxtomataj fusiloj, ili venis tra negxo kaj vento. Ili frapis sur pordotabulon mordigxinta de vermoj. Virino je flava vizagxo kaj okuloj je viola cirklo, demetis la bolton kaj la viroj kun fusiloj eniris internen. Apud la fajrejo varmigxis viro, kiu ekstarigixs ekvidinte la jxus alvenintojn. Li estis altstatura kaj havis grandajn manojn. Restis silenta kaj malvarmsange.

-Je la nomo de la popolo vi estas arestita!- eldiris unu el ili.

La virino kaj knabo je 12 jaragxa, rigardis foje la viron, foje la triopon. La pordo malfermigxis. La viroj kun fusiloj kaj la viro je manoj ligitaj malaperis en la blankecon de la negxo disjxetigxinta fare de la vento

Pasis nelonge kiam la triopo kun fusiloj kaj la viro, cxifoje je manoj liberaj, denove aperis cxe la pordosojlo.
-Povas esti eraro!- diris unu el ili al virino en teraseto, dumtempe la aliaj du estis sidigxintaj kun la dommastro apud la fajro, povas esti alia homo kiu alportis panon al diversantoj[2]. Tamen ni estis informigxintaj ke ekzistas persono en la vilagxo kiu cxiun vesperon eliris el cxi iu pordo kun sako surdorse..
La dekdujarulo auxskultis kaj rigardis foje la patron foje la anojn de Sigurimi.[3] Jugxante laux la lia mieno li ne estis kontenta ke okazis tiel. Li ion volis eldiri, ion kion li eble delonge pripensis, sed silentis. Tio vidigxis en lia konduto, en lia atitudo, en lia vizagxo. Rigardante lin vi povus konkludi ke li ne estis simple dekdujarulo, sed matura knabo, je logiko kaj voloforto. La dekdujarulo diris: - Mi jam scias kiu estas la viro eliranta kun sako surdorse cxiun vesperon; mi scias. Li enmetis en la sakon ankaux sxafinajxon, ecx bucxitan virsxafon. Tiu estas ja mia patro. Mi komprenis jam. Li vivtenas la diversantojn per mano.
La viro ekstarigxis, tuj.forkaptis la spadon kiu estis cxe la angulo kaj sin jxetis al la infano. Aliaj du kaptis lin. La edzino glaciigxis surpiede. Liaj manoj denove katenigxis..

2
Ok jaroj pasis en la korto de tiu domo ne sentante la vocxon de la dommastro. Same en auxtuno, kiam fagoj ekfaligis la foliojn sur la malnovan tegmenton, unu el la pordotabuloj malfermigxis kaj en la korton eniris la viro. Li estis maljunigxinta, la okuloj estis profundigxintaj kaj la kapo estis tondita. Revenis de la prizono. La knabo, jam dudekjarulo, cxirkauxbrakis lin, la virino ridetis. La viro staris malvarma. Ok jaroj for de propra fajrejo, ok jaroj!
Nature tio estis gxojo, li revenis en sian kamenon, fajrejon, eksentis la agrablan bonodoron de la hejmo samkiel la haladzon de la kverkaj brullignoj en la fajrejo, eligintaj dolcxan fumon.
Dum vesperoj li sidis apud la fajro plenigante kaj malplenigante la cigaredujon, pensante kaj memorante ion foran. Li parolis malmulte kaj ne rigardis la filon rekte al la okuloj.
Li kasxis en si koleron kiu bolis sovagxe, furioze, kaj atendis la okazon por eksplodi, ecx se tiu kauxzo estus malgranda. Iamfoje, indiferenta fajrero falis sur stakon de seka herbo kaj ekbruligis grandan fajron, kiun ecx se la tuta vilagxanaro arigxu, ne povis gxin estingi.

- La tonditaj haroj estas kreskigxantaj, patro!- diris al li iuvespere la filo, sidante kun li apud la kameno. La patro ne parolis, nur levis la brovojn. Kiam la virino ekridis, li kriis:
- Ne faru sxokon kun mi! Ci ne ridetacxu!-diris li al sia edzino ne rigardante la filon.

Ekpluvis. Guteto da pluvo ekfaladis mezen de la grundo. La patro staris apud la fenestro, rigardante la pluvon falanta kaj sentante la frapeton de la pluvero sur la bolkrucon kiun la dommastrino estis metinta tien por ke la grundo ne akvumigxu. La viro sin turnis al la filo, ne rigardante lin per okuloj.

---

[2] Temas pri albanoj kontrauxstarigxintaj al la nova komunisma regximo, parte trejnigxinaj eksterlande kaj enirintajn la patrion malkasxe por saboti kaj renversigi la sxtatpotencon.
[3] Sigurimi –sxtata sekreta sekurecforto

- Dimancxe mi vendos la cxevalon en la bazaro. Ni bezonas ripari la domon- diris li.
- Sed baldaux kooperativo[4] disdonos la enspezojn al siaj membroj- diris la filo,- do ni havos monon, kial ni vendu la cxevalon?
- Ah, atendu azeno gxis ekaperu la herbo! Diamancxe mi vendos la cxevalon!- ripetis la patro per nediskutebla vocxo.
- Sed mi estas promesinta doni la cxevalon al kooperativo- diris la filo.

La viro tuj sin turnis al la filo.

-Mi jam diris ke mi vendos la cxevalon dimancxe. Finite. Senvorte.,-diris li.

- La cxevalo estas ja la mia,-diris la filo.

- Kiu do estas dommastro cxi tie, mi aux vi?- konstriktis la rompigxintajn dentojn la patro.

- Ne interesas tio al mi. La problemo estas: mi petas vin lasu la cxevalon,- diris la filo.

En la cxambro auxdigxis nur la akvero falanta en bolkrucxon. Patro kaj filo rigardis unu la alian en la okulojn kaj dum momento silentis, ecx ne enspiris kelkajn sekundojn.

- Kanajlo!-ekkriis la patro denove kaj premis sur la cigaredujon per forta mano.

La filo denove ne respondis.

- Kanajlo-kriis la patro triafoje.- Mi estas farinte la kapon vian, ci volas konduti kun mi lauxplacxe. Ok jarojn mi restis en la prizono pro ci! Ci igis min ne auxdaci rigardi la homojn en la okulojn..
- En la prizonon ne enigis mi, sed via kapo,- diris la filo, ekrigardante sian patrinon, kiu estis starigxinta kaj rigardinta terurigita. Tiu rigardo demandis apogon en la okuloj de la patrino.
- Kanajlo!- kriis ankorauxfoje la altstatura viro.
- Suficxe, cxar la tuta kvartalo eksciis nian aferon,- diris la filo kaj tentis eliri eksteren.

Sed la patro kaptis lin je la jakmanikoj per dika mano kaj skuis lin. La filo klopodis eskapi de tiuj potencaj brakoj. La maniko restis en la manoj de la patro. La patrino sin jxetis mezen de ili por apartigi ilin. La viro etendis la brakon kaj forkaptis longan stangon, kiu staris cxe la cxambroangulo. Li levis gxin kiom li povis kaj jxetis sur la kapon de la filo, sed tiu lasta iomete movigxis, tiel la stango frapis ties dekstran brakon. Auxdigxis peza eksplodeto, kvazaux io rompigxus. La filo falis surteren senkonscie.

Auxdigxis nur la akvero falanta sur la bolkrucxon...

..Tutan semajnon, kusxanta sur matrace, li ne parolis. Post semajno, li komencis ellasi sensencajn sonojn. Unu brakon kaj unu kruron li apenaux povis movi. Se vi mangxigus lin, li mngxis, kontrauxe li ne mangxis mem. La patrino mangxigis lin per kulero.

- Mu-mu-mu,- respondis la filo.

Alveninta kuracisto, vizitis lin, kaj diris ke la filo plurestos tutan vivon idioton. Pasis malmulte da tempo, kiam lia afabla vizagxo komencis ricevi alian vidon.

3

[4] Kooperativo- agrikultura kolektiva labororganizajxo kiu ekspluatis la laborfortojn de vilagxanoj dum lat empo de socialismo

La patro forlasis la vilagxon kaj laboris monaton en la arbaro. En tiu arbaro patro trinkis dekojn da kilogramoj da tabako, poste li iris labori kiel sxtonrompiston en foran sxtonejon, pretiganta sxtonerojn por pavimi la stratojn. Sed finfine, li revenis hejmen, ankoraux pli faltigxinta, ankoraux pli nubigxinta, ankoraux pli silentema. Li absorbis la cigaringon en la kameno. La idioto flusalivplena sidis en la angulo de la cxambro kaj faris “mu-mu-mu”.
-Ni riparu la alian cxambron. Mi ne povas kunsidi kun cxi tiu,-diris la edzo al sia edzino. – Mi ne povas!
-Mu-mu-mu,-faris la idioto.
La vento frapis sur vitrojn. La lampo bruligxis en la rando de la kameno. La idioton kaptis la dormo tie cxe la angulo de la cxambro. Li kusxis surdorse, estis malferminta la busxon kaj el ambaux lipoekstremoj eliris flusalivo. La viro fumis. La violkoloraj cirkloj de la okuloj de la patrino farigxis pli grandaj.
La geedzoj estingis la lumon kaj endormigxis. La filo murmuris dumdormo:
-Mu-mu-mu!
La patro fermis la orelojn permane.
- Mi ne povas plu auxskulti lin!-kriis li.
- Mu-mu-mu!- respondis la filo.

Kaj tiam li eksaltis de la matraco, sin vestis kaj gxis mateno sidis apud la kameno. Li dezirus iri al kelkiu kamarado, por babili, fumi kune, sed en la vilagxo cxiuj estis abandonintaj lin. Ecx, kiam li eliris sur straton, la virinoj rigardis lin el la fenestroj kaj flustris:
-Jen li!
Kaj li ja sciis ke la homoj ne prikonsideris lin, ne amis lin. Lin penigis ilia silento, kiam li renkontis ilin hazarde surstrate. Tio estis sovagxa, malesperiga, trista, maldolcxa silento. Ili silentis kaj konsideris lin fiulon. La veron dirante, estis ankaux aliuloj kiuj estis dirintaj rekte al la okuloj ke ili malamis lin kaj ecx ne volis pluvidi lin en la vilagxo.
Iutage li malaperis. La logxantoj de la vilagxo ne vidis lin plu eliri sur la stratetojn de la vilagxo. Lin estis vidinta nur la arbargardisto, kiu estas trovinta lin pendigita sur pratempa fagobrancxego per la rimeno de siaj pantalonoj. Li pendigintis sin. Tiel finigxis tiu historio, la historio de Gani kaj ties patro.
Ni surcxevaligxis kaj nin kasxis en la densan arbaron.

**Enesperantigis Bardhyl Selimi**

## artikolo pri lernejaj ferioj aperis Inbox

Reinhard Pflueger <butenplatt@gmx.de> to reinhard.pflue. More options

Saluton,

unue dankon al cxiuj el vi, kiuj kontribuis per informoj pri lernejaj ferioj. Mi nur devis konstati, ke multe da miskomprenoj okazis pri mia intenco kaj la formularo. Do mi devis prilabori cxiujn kontribuojn (kelkajn malmulte, kelkajn pli). Tial mi petas
- la kontribuintojn: kontroli, cxu cxio estas gxusta;
- la ceterajn, kiuj konsideras kontribui: mem rekte redakti la artikolon (se vi ial hezitas fari tion, sendu al mi, sed ankaux tiukaze rigardu, kiel aspektu, alklakante "redaktu" supre cxe la artikolo.

La adreso por rekte aliri gxin estas http://eo.wikipedia.org/wiki/Lernejaj_ferioj

Krom el viaj kontribuoj kaj mia propra scio pri Germanio mi cxerpis el la malmultaj nacilingvaj Vikipedioj, kiuj havas tauxgan kontribuon (germana, nederlanda, sveda). Do se vi estas nederlandano, belgo, svedo, vi jam trovos tekston, kiun vi bonvolu kontroli.

Reinhard Pflüger
Deutschherrnufer 45
60594 Frankfurt
Germanio
+49-69-597 84 67
reinhard.pflueger@esperanto.de